Johann Wolfgang von Goethe,

# Limoj de l'homaro

*tradukita de Alexander Taussig*

Se la praega
Sankta la patro
..................
El nuboj rulsonaj
Sendas fulmbenojn
Super la teron,
Mi de l'vestaĵo
Lia la randon
Kisas timeme,
Fidon en brusto.

Ĉar kun la dioj
Sin ne komparu
Homa estaĵ'!
Se lia verto
Tuŝas la stelojn
Tiam nenie
Plandoj malcertaj
Povas sin kroĉi
Kaj kun li ludas
Nuboj kaj ventoj.

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

# Grenzen der Menschheit

Wenn der uralte
Heilige Vater
Mit gelassener Hand
Aus rollenden Wolken
Segnende Blitze
Über die Erde sät,
Küss' ich den letzten
Saum seines Kleides,
Kindliche Schauer
Treu in der Brust.

Denn mit Göttern
soll sich nicht messen
Irgendein Mensch!
Hebt er sich aufwärts
Und berührt
Mit dem Scheitel die Sterne,
Nirgends haften dann
Die unsichern Sohlen,
Und mit ihm spielen
Wolken und Winde.

. . .

Se li kun ostoj
Firmaj, fortikaj
Staras sur tero
Daŭre fondita,
Li ne kapablas
Eĉ sin kompari
Nek kun la kverko
Nek kun la vito.

Kio distingas
Diojn de l'homoj?
Ke antaŭ tiuj
Migras ondaro,
Eterna torent':
Ondo nin levas,
Ond' nin englutas,
Ni alfundiĝas.

Rondo malvasta
Vivon limigas
Nian kaj multaj
Generacioj
Daŭre viciĝas
Al ĉeno senfina
De la ekzisto.

. . .

Steht er mit festen,
Markigen Knochen
Auf der wohlgegründeten
Dauernden Erde;
Reicht er nicht auf,
Nur mit der Eiche
Oder der Rebe
Sich zu vergleichen.

Was unterscheidet
Götter von Menschen?
Dass viele Wellen
Vor jenen wandeln,
Ein ewiger Strom:
Uns hebt die Welle,
Verschlingt die Welle,
Und wir versinken.

Ein kleiner Ring
Begrenzt unser Leben.
Und viele Geschlechter
Reihen sich dauernd
An ihres Daseins
Unendliche Kette.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Grenzen der Menschheit" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Alexander Taussig *(∗1865-08-24).*

*Arg-493-961 (2009-08-17 13:25:21)*

*Pri la tradukinto Alexander Taussig vidu la vikipedian retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Alexander_Taussig`. *Lia traduko troviĝas en* `www.literaturo.dk`, *en* `http://www.literaturo.dk/limoj.htm`.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-493-960 (2009-08-17 12:42:26)*